# Dua alvoko al la ILEI-kongreso 2025 – Beogrado, Serbio

Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kaj ILEI kore invitas vin al la **58-a kongreso de ILEI**, kiu okazos unuafoje **en Beogrado, de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2025**. Ĉi tiu evento estos neforgesebla okazo por kunveni, lerni kaj ĝui la unikan etoson de la ĉefurbo de Serbio.

La ĉefa temo de la kongreso kaj ties simpozio estas: **Artefarita intelekto kaj lingvolernado**.

**Kial vi nepre partoprenu?**

Ĉiu partoprenanto trovos ion por si. Vi renkontos malnovajn kaj novajn geamikojn, lernos ion novan kaj lernigos al la aliaj ion el viaj spertoj. Abundos la turisma kaj kultur-arta programo en la tradicia amika etoso de la ĉefevento de ILEI.

Ĉu vi estas ILEI-membro aŭ ne, ĉiuj estas bonvenaj! Ni bonvenigas ankaŭ lernantojn, homojn, kiuj interesiĝas pri instruado kaj ĝenerale ĉiujn esperantistojn de iu ajn lingvo-nivelo inkluzive akompanantojn kaj komencantojn.

**Kotizrabatoj:** Ne maltrafu la ŝancon ĝui malaltajn kotizojn de la unua aliĝperiodo, ĝis la fino de marto 2025!



**Kongresejo kaj loĝado – Hotelo Palace**

Ĉio en unu loko (kongresejo, loĝado, manĝoj) kreas idealan medion por grupa spirito kaj kunlabora etoso. La centjaran historion de la kvarstela Hotelo „Palace" (Palas) akompanas modernaj organizo kaj ekipaĵo, igante ĝin unu el la plej famaj klasikaj hoteloj de Beogrado.

La hotelo situas en la malnova urbocentro, proksime de la ĉefa piedira zono, la Knez-Mihailova Strato. Ĝia pozicio estas tre favora, en trankvila parto de la urbo, najbare de historiaj kaj kulturaj vidindaĵoj, urbaj kaj ŝtataj institucioj, muzeoj, teatroj, kinejoj, butikcentroj, la Beograda fortikaĵo kaj Skadarlija – la fama bohema kvartalo. Ĝi estas facile atingebla de la Beograda Flughaveno „Nikola Tesla".

La hotelo disponigas kvar diversgrandajn kaj diverstipajn salonojn por la kongresaj programeroj.

Loĝ- kaj manĝmendilo estas alirebla en la kongresa retejo, retejo de ILEI, kaj ankaŭ helpe de la ĉi tie aldonita QR-kodo.

**Kie vi trovas pliajn informojn?**
- Retejo de la kongreso: *2025.kongreso.org* (alklaku al la emblemo de ILEI por pluiri al la ĉefa paĝo) aŭ *2025.kongreso.org/ilei-chefa.html*
- Rekta ligilo al la aliĝilo: *2025.kongreso.org/alighilo.html*
- Retejo de ILEI: *ilei.info*
- Eventaservo: *eventaservo.org/e/ILEI-58*
- Telegram-grupo: *t.me/Beogrado2025*

Se vi havas demandojn, ne hezitu kontakti nin: *ilei<ĉe>kongreso.org, serbialigo<ĉe>gmail.com* aŭ *laslo.az<ĉe>gmail.com*. Al la samaj adresoj vi povas sendi viajn kontribuproponojn.

**Programkontribuoj**

Ni antaŭĝojas pri viaj partopreno kaj kunlaboro por igi ĉi tiun kongreson memorinda! Proponu viajn kontribuaĵojn por pli riĉa kaj pli ĝuinda programo! Ekzemple, kolegino el Korea Respubliko proponas kurson pri koreaj dancoj. Se vi deziras dividi viajn spertojn pri instruado de Esperanto aŭ edukado per Esperanto, gvidi laborgrupon, atelieron aŭ diskutrondon pri grava temo el la vivo de ILEI, gvidi kurson por komencantoj aŭ progresantoj, prelegi en la simpozio pri la kongresa temo, aŭ pri alia temo ekstersimpozie, aŭ vi pretas kontribui al la kultur-arta programo, prezenti vian lingvon en la

lingva festivalo kaj vian gastronomion dum la interkona frandvespero – bonvolu indiki tion en via aliĝilo, aŭ skribi al la ĉi-supre indikitaj adresoj de la organizantoj.

**Konatiĝu kun la kongresurbo**

Per duontagaj kaj promenaj ekskursoj vi malkovros la ĉarmon de unu el la plej malnovaj ĉefurboj de Eŭropo, la tamen ĉiam juna kaj gastama Beogrado. La komplekso de la Beograda fortikaĵo kaj parko Kalemegdan, la Nacia muzeo kun eksponaĵoj de la prahistorio ĝis la modernaj artoj, arkitekturaj perloj jam je promendistanco de la kongresejo, la Muzeo de Nikola Tesla kun la plej granda en la mondo kolekto de aŭtentikaj dokumentoj kaj objektoj el la verkaro kaj vivo de Tesla, la monto Avala kaj 203 metrojn alta televida turo kun restoracio je la 119-a kaj elvidejo je la 122-a metro de ĝia alto, estas nur kelkaj el la vizitotaj vidindaĵoj de la kongresurbo.



**Enrigardu la kulturon kaj naturon de la kongreslando**

Kvar tuttagaj ekskursoj proksimigos vin al la nacia spirito, historia heredaĵo, natura kaj kultura riĉeco de Serbio. Du aŭ tri estos ofertitaj por la ekskursa tago – merkredo. Ankaŭ en aliaj tagoj vi povos ekskursi se tio plaĉos al vi pli ol tiutaga programo en la kongresejo. La turisma oferto kun mendilo estos afiŝita tra la kutimaj komunikkanaloj.

Unu el la ekskursoj gvidos al **Novi Sad**, la ĉefurbo de Vojvodino (la norda aŭtonoma provinco de Serbio), kun la impona **Petrovaradina fortikaĵo** (*vd la foton sur p.34.*), kiu siatempe estis nekonkerebla per la tiama milita tekniko, sed hodiaŭ estas konata kiel loko de muzeoj, arkivoj, atelieroj kaj, ekde la jaro 2001, okazejo de la fama muzikfestivalo **Exit**. La ekskursantoj ekkonos ankaŭ la ĉarmon de la proksima urbeto **Sremski Karlovci** kaj naturan riĉon de la montaro **Fruŝka Gora**, unu el la malmultaj en la ebena Panonio, kun trezorejoj de la serba klero kaj kulturo: la plej aĝa serba gimnazio el la 18-a jarcento, Patriarka palaco kaj Teologia seminario en Sremski Karlovci, kaj la monaĥejo **Kruŝedol** el la 16-a jarcento inter la deklivoj de Fruŝka Gora.

La dua tuttaga ekskurso gvidos suden, al **Kragujevac**, la unua ĉefurbo de Serbio post la liberiĝo elsub la Otomana imperio komence de la 19-a jarcento. Inter la ekskursceloj estas:

- La memorkomplekso **Oktobro de Kragujevac**, dediĉita al la viktimoj de la nazia teroro en la Dua mondmilito, kaj aliaj vidindaĵoj en la urbo;
- La proksima urbo **Topola** kun la preĝej-maŭzoleo de la dinastio Karadjordjeviĉ sur la monto **Oplenac**, ornamita per 752 mozaikaj replikoj de famaj freskoj el serbaj mezepokaj monaĥejoj sur 3 500 kvadrataj metroj de la interna mura surfaco, kiuj konsistas el 40 milionoj da diverskoloraj vitraj kubetoj en 15 000 nuancoj;
- La **Fortikaĵo de Karadjordje** el la Unua serba ribelo kontraŭ turkoj (1804) kaj la muzeo en la **domo de Reĝo Petro la 1-a** en Topola;
- Tipa serbia vilaĝo kun tradicia tagmanĝo en vilaĝfamilia etoso.

La ekskurso orienten, al **Smederevo** kaj **Viminacium,** kunigos la mezepokan historion de Serbio kun la tempo, kiam plejparto de ĝia nuna teritorio apartenis al la romia provinco Supra Mezio (Moesia Superior), kaj kun la tempoj de mamutoj. En Smederevo, 50 km for de Beogrado, sur la dekstra bordo de Danubo, staras unu el la plej grandaj mezepokaj fortikaĵoj en Eŭropo. La **muzeo de Smederevo** gardas prinaturan, arkeologian, historian, numismatikan, etnologian kaj belartan kolektojn. En **Viminacium** vi esploros **arkeologian parkon** kun romia armea tendaro, **gladiatora areno**, antikvaj tomboj kaj **mamutparko** – vera vojaĝo reen al la romia epoko kun rava enrigardo en miocenan prahistorion de mamuloj.

Per la ekskurso sudorienten al la regiono de la rivero **Resava**, malkovru la naturan kaj historian riĉecon de Serbio je nur 140 km for de Beogrado kaj paŝu profunde en la geologian historion de la Tero.

- Vizitu la monaĥejon **Manasija**, arkitekturan kaj freskoartan majstroverkon de serba mezepoka kulturo, sidejon de la fama Resava Skolo – manskriba kaj tradukista ateliero, siatempa centro de spirita kulturo kaj klereco.
- Esploru la imponan **Kavernon de Resava**, kun ĝiaj stalaktitoj, stalagmitoj kaj ŝtoniĝintaj akvofaloj en koloroj ruĝa, flava kaj blanka, aĝaj 45 milionojn da jaroj.
- Miru pri la pitoreska **Veliki Buk**, la „Granda Bruo", unu el la plej altaj kaj plej belaj akvofaloj en Serbio.

### Karavane al la UK en Brno

Por sabato, la 26-a de julio, estas planata bustransporto al Brno kun ekiro post la matenmanĝo por atingi la posttagmezajn programerojn tie. Ĝi estos mendebla kune kun aliaj turismaj programeroj.

*Por la LKK: Aranka LASLO, Laura BRAZZABENI, Radojica PETROVIĆ, Bojan VELIČKOVIĆ*